

Hertha Koenig,  
Falsteloj

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Brilas kun steloj la nokt' de Juli'.  
Se el la tuta ĉiela or'  
Falus malsupren steleto for,  
Helo eble ekestus sur Ter' ...  
Vidu, jen flugas ĝi tra la aer' –  
Malaperas en tomba malhel',  
Brilis ja ore de l' fora ĉiel'.

*Traduko de la Germana poemo "Sternschnuppen" de HERTHA KOENIG (\*1884-10-24 – †1976-10-12) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2002-03-20.*

*MR-376-1c / Arg-382-753 (2007-02-01 11:18:29)*

*La poemo aperis en la volumo "Printempo en Aŭtuno, kolektitaj poemoj" (Frühling im Herbst, Gesammelte Gedichte) en la eldonejo Pendragon, Stapenhorststr. 15, D-33615 Bielefeld, Germanio, tel. 0049-(0)521-69689, fax 0049-(0)521-74470. La eldonisto, s-ro Günther Butkus, permesis al mi, Manfred Retzlaff, la 27an de Majo 2002, ke mi publikigu la poemon kun mia traduko en Esperanton.*